Bob Dylon ,

# Die Antwort weiß ganz allein der Wind

*tradukita de Hans Bradtke*

Wie viele Straßen auf dieser Welt
sind Straßen voll Tränen und Leid?
Wie viele Meere auf dieser Welt
sind Meere der Einsamkeit?

Wie viele Mütter sind lang schon allein
und warten und warten noch heut?
Die Antwort, mein Freund, sie will gefunden sein,
Die Antwort muss unser Leben sein.

Wie viele Menschen sind heut noch nicht frei
und würden es so gerne sein?
Wie viele Kinder gehn abends zur Ruh
und schlafen vor Hunger nicht ein?

Wie viele Tränen erflehen bei Nacht:
Wann wird es für uns anders sein?
Die Antwort, mein Freund, sie will gefunden sein,
Die Antwort muss unser Leben sein.

Wie viele Berge von Geld gibt man aus
für Bomben, Raketen und Tod?
Wie gro0e Worte macht heut mancher Mann
und lindert damit keine Not?

. . .

Bob Dylon ,

# Kiom da mono elspezas la hom’

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kiom da mono elspezas la hom’
Por la armilar’ sur la ter’ ? -
Kaj kiom da vortoj diratas de li?
Kaj ne malpliiĝas mizer’ !

Ĉu devos okazi la lasta milit’
Kun neimagebla mizer’ ?
Respondon, amik’, ja scias nur la vent’,
Repondon ja scias nur la vent’.

Kiom da stratoj sur tiu ĉi ter’
Kondukas al senesperec’ ? -
Kaj tiom da maroj en tiu ĉi mond’
Plenplenas de plor’ kaj tristec’ ? -

Kaj kiom da inoj atendas, ho ve,
Kaj restas en tia solec’ ?
Respondon, amik’, ja scias nur la vent’,
Repondon ja scias nur la vent’.

Kiom da homoj en malliberec’
Suferas nur pro opini’ ? -
Kaj kiom da homaj infanoj, ho jes,
Malsatas sur ter tiu ĉi?

. . .

Bob Dylon ,

# Kiom da mono elspezas la mond’

*tradukita de Joachim Gießner*

Kiom da mono elspezas la mond’
por bomboj, raketoj kaj mort’ ?
Multaj sin gloras, paradas per bus’,
sufer’ nek mildiĝas nek sort’.

Kiom okazu ankoraŭ mizer’,
ĝis venos por savo la vort’.?
Respondas, amik’, tutsole nur la vent’,
respondas tutsole nur la vent’.

Kiom da vojoj en tuta la mond’
abundas per larmoj, sufer’ ?
Kaj oceanoj ĝis mara profund’
plenplenas per trista mizer’ !

Kiom da inoj dum tutsola viv’
atendas en vea toler’ ?
Respondas, amik’, tutsole nur la vent’,
respondas tutsole nur la vent’.

Kiom da homoj en malliberec’
sopiras la ŝanĝon de l’ stat’ ?
Kaj geinfanoj milionoj dum nokt’
ne dormas pro morda malsat’ !

. . .

Wie großes Unheil muss erst noch geschehn,
damit sich die Menschheit besinnt?
Die Antwort, mein Freund, sie will gefunden sein,
Die Antwort muss unser Leben sein.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, ∗1941-05-24) en la Germanan de* Hans Bradtke *(∗1920-07-21 – †1997-05-12).*

*Arg-720-1448 (2012-12-11 09:13:17)*

*Siehe auch:* `http://www.sjd-falken.de/lieder/die_antwort_weiss_ganz_allein_der_wind.shtml`. *Pri la tradukinto vidu:* `http://www.discogs.com/artist/Hans+Bradtke?anv=H.+Bradtke&filter_anv=1` *kaj la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hans_Bradtke`.

Kaj kial la revoj sur pac' sur al ter'
Ne efektiviĝas sur ĝi?
Respondon, amik', ja scias nur la vent',
Repondon ja scias nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, ∗1941-05-24) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984-04-29.*

*MR-148-1 / Arg-720-1447 (2012-12-11 09:05:35)*

*La melodio de tiu ĉi kanto, kiun verkis la aŭtoro Bob Dylon (civila nomo: Robert Allen Zimmermann) ankaŭ, aŭdeblas en* `http://www.youtube.com/watch?v=tG08snK98l0`. *Pri la muziknotoj vidu:* `http://de.scribd.com/doc/9589786/Bob-Dylan-Blowin-in-the-wind-notes`.

Kiom da homoj noktpetas en rev':
"Ho venu al ni bonas fat'!"
Respondas, amik', tutsole nur la vent',
respondas tutsole nur la vent'.

*Traduko de la Angla poemo "Blowin' in the Wind" de* Bob Dylon *(civila nomo: Robert Allen Zimmermann, ∗1941-05-24) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-720-1449 (2012-12-11 09:50:59)*

*Troveblas tiu ĉi esperantigo de la kanto-teksto en* `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf` *sub* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`. *Pri Joachim Gießner vidu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Gie%C3%9Fner`.